Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Monda Turisma Tago, 27 septembro 2019

Monda Turisma Tago de UN, kiun oni festas la **27-an de septembro** ĉiujare, estas okazo por observi la signifon de turismo kiel rimedo por renkontigi homojn trans regionaj kaj landaj limoj kaj kultivi en ili spiriton de reciproka respekto kaj kompreno. La Internacia Lingvo Esperanto, kiu estis kreita por ebligi komunikadon inter homoj kies lingvoj estas diversaj, kaj sekve krei respekton kaj interkompreniĝon, perfekte respegulas la celojn de la Monda Turisma Tago.

En la nuna mondo, kie klimatŝanĝiĝo kaj la malmultiĝo de naturaj rimedoj estas afero de urĝa internacia atento, persona kontakto inter homoj el diversaj kulturoj kaj lingvoj tamen restas grava por reciproka kompreniĝo kaj la kultivado de paco. Antaŭ du jaroj, la 102-a Universala Kongreso de Esperanto, en Seulo, en julio 2017, rekonante la Internacian Jaron de Daŭripova Turismo por Evoluigo 2017, substrekis en sia fina kongresa rezolucio “la gravecon de daŭripova turismo por la tutmonda Esperanto-lingvokomunumo” kaj notis “la esencan rolon kiun ludas komuna lingvokono en la perado de reciprokaj kontaktoj inter homoj de malsamaj kulturoj, kaj la unikajn kontribuojn de Esperanto sur tiu kampo.”

Rekonanter la gravecon de daŭripoveco, la kongreso emfazis “la urĝecon redukti la ekologiajn kaj sociajn damaĝojn, kiujn kaŭzas multaj formoj de turismo, kaj disvolvi novajn kaj pli daŭripovajn formojn.”

Universala Esperanto-Asocio, kaj la tuta Esperanto-movado, daŭrigas tiun laboron, renovigante sian volon, en kunlaboro kun Unuiĝintaj Nacioj kaj ties Monda Turisma Organizaĵo “daŭre labori por aktive engaĝi, eduki kaj inspiri homojn en ĉiuj landoj al pli inkluziva kaj konscia turisma kulturo.”

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041